

# Terminara Kuriero

TeKu 136

Aprilo 2009

## Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: Hoffmann-IFEF@cablemail.de

### Saluton en nia jubilea jaro!

En Aŭgusto 2008 mi informis pri perturboj en la datumbanka programaro. Intertempe *UIC* sendis disketon kun iomete pli-bonigita dosieraro. Mi tamen konstatis kelkajn perturbojn ĉe enigo de tekstoj. Kolegino *Taucher* kaj mi timas, ke la kvoto de malĝustigoj kreskus dum pli ampleksaj enigoj. Nuntempe firmao volas baldaŭ fini evoluigon de nova programaro, por ke enigoj sukcesu, kaj *RailLexic 4.0* povu aperi en ĉi tiu somero. Aktuale troviĝas 473 Esperanto-difinoj ĉe *UIC*, kaj 950 tekstoj estas preparitaj ĉe mi por tuja enigo.

Por prepari 61-an IFEF-kongreson, jen la lasta stato de **alvenintaj elektoj**:

<b>TeKu 134</b>	<b>dana grupo</b>	<b>Zlatko Hinš</b>	<b>Zdeněk Polák</b>
11477	rapidoreguligo	rapidoreguligo	rapidoreguligo
11478	rapidoregado	rapidoregadmetodo	rapidoregado
12724	transformilo regtabula (komputila regejo)	transformilo regtabula (komputila regejo)	transformilo regtabula (komputila regejo)
12736	horarprocesoro	horarprocesoro (ĉar ne ekzistas termino kun „optimumigo“)	horarprocesoro
12740	bariero tutbara	bariero totalbara	bariero totalbara aŭ bariero tutbara
<b>Teku 135</b>			
00076	puŝo ĉe bremsoplenigo		puŝo ĉe bremsoplenigo
02450	plenigogrado		plenigogrado
02695	radodiametro reltuŝa		radodiametro reltuŝa
03822	flukso devojiĝa		
08824	ĉasistego		ĉasistego
10341	katendaria sistemalto		
12750	trakanteno (Balizo)	trakbalizo	trakanteno (Balizo) aŭ trakanteno „Balizo“
12751	trakanteno pasiva		trakanteno pasiva
12752	trakanteno aktiva		trakanteno aktiva

Sekve estu deciditaj la terminoj 11477, 12724, 12736.

Por havi nekomplikan superrigardon, jen ripeto de ankoraŭ **solvendaj taskoj**. Pri nacilingvaj terminoj kaj necesaj klarigoj legu en la lastaj du TeKu-oj.

**TeKu 134**

**11478** Metodo aŭ aranĝo por observi la donitan normrapidon en apartenanta tolerospaco.  
terminproponoj: **1) rapidoregado 2) rapidoregadmetodo 3) rapidoreguligmetodo**

**12740** Bariero por bari tutan larĝon de ŝoseo.

terminproponoj: **1) bariero totala 2) bariero totalbara 3) bariero tutbara**

**TeKu 135**

**00076** Rapida plenigo de bremsaera ĉefkondukotubo per nestringata premaero el ĉefaerujo, super regula pretecpremo.

terminproponoj: **1) puŝo ĉe bremsoplenigo 2) bremsotubplenigo forte ekprema**

**02450** Proporcio inter fakta kaj plena enhavoj en laborspaco de hidrodinamika sistemo.

terminproponoj: **1) enlasgrado 2) plenigogrado**

**02695** Duobla distanco inter geometria mezo de radakso kaj tuŝpunkto rado / relo.

terminpropono: **radodiametro reltuŝa**

Mi konstatis, ke la nocio 08824 havas sub 00454 egalan difinon. Tamen la nacilingvaj terminoj plejkaze diferencas. Por via elekto bonvole komparu:

**00454 / 08824** Ĉasioparto ĉefe de varvagonoj, por pli da firmeco kaj rigideco de la ĉasiosparoj.

	<b>00454</b>	<b>08824</b>
ĉeĥa	<i>výztuž podélníku</i>	<i>vzpěradlo</i>
dana	<i>længdedragerforstærkning</i>	<i>stiver for længdedrager</i>
franca	<i>armature de brancard</i>	<i>tirant de brancard</i>
germana	<i>Sprengwerk</i>	<i>Sprengwerk</i>
hungara	<i>feszítőmű</i>	<i>feszítőrud</i>
itala	<i>armatura di rinforzo del longherone</i>	<i>tirante di longherone</i>
pola	<i>podciąg ostojnicy</i>	<i>podciąg</i>
rumana	<i>armătură de longeron</i>	<i>tirant de contrafișă</i>
serba	<i>pojačanje uzdužnog nosača</i>	<i>podupirač</i>
terminproponoj:	<b>1) ĉasiorigidigaĵo 2) ĉasioŝtego</b>	

**10341** Vertikala distanco inter la ĉefa portkablo kaj kontaktodrato ĉe suspensiopunkto.

terminproponoj: **1) katenaria alto 2) katenaria sistemalto 3) katenaria konstruckia alto**

**12750** Aparato ĉe trako, kiu transsendas datumojn al trajno, por aktualigi la aŭtomatajn sekurecinstalaĵojn ĉe veturiloj koncerne trak- kaj signalil- kondiĉojn sur la sekvanta liniosekcio.

angla	<i>track antenna; beacon; balise</i>	franca	<i>balise</i>
		germana	<i>Balise; Gleisantenne; Gleisbake</i>

Por klare montri, ke „Balizo” aŭ „Balise” estu ne termino, sed propra nomo, mi pripensis tri novajn proponojn:

**1) trakanteno „Balizo” 2) trakanteno „Eŭrobalizo” 3) trakanteno „Eurobalise”**

Pri la sekvaj du nocioj mi kompletigis la nacilingvajn terminojn el *RailLexic*.

**12751** Trakanteno ne daŭre transsendanta datumojn, sed demandata per surveturanta trajno, por transsendi datumojn al aŭtomata trajnsekuriga sistemo.

angla *transponder* franca *transpondeur* germana *Gleiskoppelspule*  
 terminpropono: **trakanteno pasiva**

**12752** Trakanteno daŭre transsendanta datumojn.

angla *active beacon* franca *balise active* germana *aktive Balise*  
 terminpropono: **trakanteno aktiva**

Jen kelkaj **novaj taskoj**:

► Legante la difinon 01926 okulfrapas komparo kun la difino 01923 kaj ties jam taŭga termino. Jen la du difinoj kaj koncernaj nacilingvaj terminoj:

### **01923 ĉefkondukotubo bremsaera**

Seninterrompa premaer-kondukotubo

- liganta kondukistan bremsregvalvon kun bremsekipaĵo de veturiloj,
- reganta bremsadon kaj lozigadon, kaj
- repleniganta la aerujon post bremsado.

**01926** Seninterrompa premaer-kondukotubo de dukondukila bremsa,

- ligita kun ĉefaerujo sub daŭre alta premo,
- kontinue repleniganta helpaerujojn de vagonoj kaj ankaŭ specialajn instalaĵojn, ekzemple elektromagnetan relefikan bremsaon aŭ pordofermilojn.

	<b>01923</b>	<b>01926</b>
ĉeĥa	<i>hlavní brzdové potrubí</i>	<i>potrubí hlavního vzduchojemu</i>
dana	<i>bremseledning</i>	<i>hovedluftbeholderledning</i>
franca	<i>conduite générale de frein</i>	<i>conduite principale</i>
germana	<i>Hauptluftleitung</i>	<i>Hauptluftbehälterleitung</i>
hungara	<i>főfékvezeték</i>	<i>főlégtartály vezeték</i>
itala	<i>condotta generale</i>	<i>condotta principale</i>
pola	<i>przewód główny</i>	<i>przewód zbiornika głównego powietrza</i>
rumana	<i>conductă generală</i>	<i>conductă principală</i>
serba	<i>glavni vazdušni vod</i>	<i>ulazni napojni vod</i>

Por elekta taŭgan terminon **01926** anstataŭ la ĝisnuna „ĉefaerkondukotubo (bremsa, pneŭmataj helpaparatoj)”, jen du proponoj:

**1) kondukotubo bremsaera kontinupleniga**

**2) kondukotubo de dukondukila bremsa**

► Laste mi deziras finfine solvi la problemon de du vaporlokomotivaj specoj, jam traktita en TeKu 113 (2001), sed poste ne daŭrigita. *UIC* ne donis la difinojn, sed la nocioj estas klaraj laŭ jenaj bildoj:

	<b>05241</b>	<b>05242</b>
angla	<i>tank locomotive</i>	<i>tender locomotive</i>
ĉeĥa	<i>tendrová lokomotiva</i>	<i>lokomotiva s tendrom</i>
dana	<i>tenderlokomotiv</i>	<i>lokomotiv med separat tender</i>
franca	<i>locomotive-tender</i>	<i>locomotive à tender séparé</i>
germana	<i>Tenderlokomotive</i>	<i>Schlepptenderlokomotive</i>
hungara	<i>szertartályos mozdony</i>	<i>szerkocsis mozdony</i>
itala	<i>locomotiva tender</i>	<i>locomotiva a tender separato</i>
pola	<i>parowóz tendrzak</i>	<i>lokomotywa z tendrem oddzielnym</i>
rumana	<i>locomotivă tender</i>	<i>locomotivă cu tender separat</i>
serba	<i>lokomotiva sa tenderom</i>	<i>lokomotiva sa posebnim tenderom</i>
Esperanto	tendrolokomotivo	lokomotivo kun aparta tendro

La problemo venas de tre malklara esprimo „tendrolokomotivo”, ĉu taŭga por 05241 aŭ 05242? PIV klarigas:

**tendro** Specialforma vagono, kiu estas senpere alligita al vapormova lokomotivo kaj en kiu troviĝas rezervo da karbo kaj akvo.

Por eviti miskomprenon, mi proponas decidi jenajn terminŝanĝojn:

**05241 cisternlokomotivo**

**05242 tendrotrena lokomotivo**

**HORST THEURICH**, iam tre aktiva fervojisto-esperantisto, mortis lastan decembron, neatendite, pro maligna malsano. Kvankam li pro simplaj miskomprenoj bedaŭrinde retiriĝis de nia fervojista movado kaj dum la lastaj pli ol dek jaroj ne plu estis GEFA / IFEF-membro, li pro sia multjara antaŭa agado daŭre havos indan lokon en nia memoro.

En la tiama Fakgrupo de Fervojistoj-Esperantistoj (FFE) en Germana Demokratia Respubliko li responsis kiel estrarano tre zorgeme kaj kompetente pri terminara laboro, kunagante kun fakuloj de aliaj landaj IFEF-sekcioj, precipe kun *Heinz Dieter Hartig*. Ofte li partoprenis diversajn Esperanto-aranĝojn kaj kontribuis per prelegetoj.

*Horst* ripozu en paco!

*Achim Meinel*, prezidanto de nuna GEFA kaj de iama FFE

**Karaj geamikoj**, mi deziras al la kongresaj partoprenontoj agrablan vojaĝon al Triesto. Kunlaborantojn kiuj ne povos partopreni, mi afable petas antaŭe skribi aŭ rete sendi opiniojn.

Via *Heinz Hoffmann*